408.92 : 415.4 : 413.239

**Naŭlingva Etimologia Leksikono** de *Louis Bastien*. Nova eldono, 1950, Esperanto Publishing Company; bindita; prezo 12 ŝil. 6 p.

Laŭ la antaŭparolo de tiu ĉi dua eldono la Naŭlingva Etimologia Leksikono celas:

1°. Montri devenon de la esperanta vortaro kaj pruvi ĝian internaciecon.

2°. Plifaciligi memoriĝon pri radikoj al tiuj, kiuj iom konas aliajn lingvojn.

3°. Veki la intereson de la leganto, montrante rilatojn inter vortoj de esperanto kaj de lia propra lingvo.

Ĉu la libro respondas al tiu celo? Ĝenerale jes, kvankam certe restas kelkaj dezirindaĵoj. Pristudante ĝin oni estas ofte trafata de interesa parenceco inter vortoj ĉu diverslingvaj, ĉu en Esperanto mem. Precipe al la kompreno pri parenceco de Esperantaj vortoj inter si multe kontribuas la filologiaj notoj, kie la verkinto grupigis Esperantan familion derivitan de unu vorto. Prave la verkinto enkondukas la leksikonon per konciza klarigo pri la deveno de la nuntempaj eŭropaj lingvoj kaj per fonetikaj rimarkoj. En multaj rilatoj tiu ĉi verko estas do lerniga kaj tiuj samideanoj kiuj havas iom da lingva interesiĝo, kun plezuro serĉos kaj trovos instruon en ĝi.

Aliflanke mi ne povas prisilenti kelkajn malpli bonajn ecojn. La sufiĉe multaj preseraroj estas bedaŭrindaj kaj nepre devus esti evititaj en leksikono, kie la formo de la vortoj ja speciale gravas. Tamen tiuj eraroj, kiel Esp. pantaleno anst. pantalono, partra anst. patra, bandaĝlo anst. bandaĝo, itala: *doeumento* anst. *documento*, ne estas la plej gravaj. Pli gravaj estas eraraj vortoj kaj tradukoj, kiel sur paĝo 178 latina: *mathematicus*, kiu signifas „matematikisto", sed laŭ tiu ĉi verko estas samsignifa kun matematiko. Sur la sama paĝo mi trovis ankoraŭ du erarojn en la latina kolono: „milo da paŝoj" ne estas *„millia passuum"*, sed *„mille passus"* kaj „mielo" ne estas *„melo"* sed *„mel"*. La germana vorto *„miserabel"* ne signifas „mizerulo", sed „mizera". La vorton „vaki" Bastien derivas de lat. *„vacanta"*; korekta estus *„vacare"*. Bedaŭrinde ankaŭ mankas vortoj, ekz. lat. *„legenda"* ĉe legendo, *„supponere"* ĉe supozi, *„bustum"* ĉe busto, *„missa"* ĉe meso.

Fakte la elekto de la ok lingvoj (latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa) estas iom arbitra. Oni povus demandi, kial kvin romanaj lingvoj aperas flanke de nur unu ĝermana. Konforme al la tria suprenomita celo oni ŝatus vidi almenaŭ unu skandinavian lingvon kaj eble ankaŭ unu slavan krom la rusan.

Kompreneble en tiu okazo la helpo de pli da kunlaborantoj estus necesa. La problemo de la elekto verŝajne restos ankaŭ post aldono de unu aŭ du lingvoj kaj eble neniam ĉiu leganto estos kontenta. Sed alia pli pozitive respondebla demando estas, ĉu enmeto de malnovgreka kolono ne estus rekomendinda, precipe por efektivigi la unuan punkton de la celo, esprimita en la antaŭparolo. Multaj modernaj vortoj troviĝantaj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj estas de greka origino. Tiujn vortojn Bastien pritraktis nekonsekvence. Parte li mencias ilin en latina formo *(metaphysica, metaphora, metamorphosis, methodus, metropolis, martyr, mythus, periodus, philosophia)*, parte la antikva origino mankas (ekz. de metempsikozo, meteoro, paleografio, panteismo, psikologio, entuziasmo, epidemio). Li eĉ tiugrade intermiksas latinajn kaj grekajn radikojn, ke li asertas en noto sur paĝo 184, ke la latina radiko *mist-* signifas kaŝita.



Ankoraŭ unu rimarko: la gramatikaj vortoj, kiel prepozicioj, konjunkcioj kaj adverboj, ne estas enskribitaj, ĉar „ilia klarigo apartenas al la gramatika morfologio." Tamen estus interese vidi ankaŭ de tiaj vortoj la devenon.

Malgraŭ la nomitaj dezirindaĵoj ni devas esti dankaj al la verkinto kaj liaj kunlaborintoj pro tiu ĉi verko. Ĝiaj meritoj estas nekontesteble grandaj.

A. J. Middelkoop.

519.2 : 517.9

Prof. dr. O. Reiersøl: **Diferencialaj ekvacioj de specimenaraj distribuoj.**

Prof. dr. O. Reiersøl: **Transiro per diferencialaj ekvacioj de probablodenso al karakteriza funkcio kaj inverse.** [1])

Eldonoj de la Sociekonomia Instituto de la Universitato en Oslo.

La traktaĵoj enhavas multajn statistikajn terminojn, precipe en la enkonduko de la unua, sed ankaŭ dissemitaj tra la tuta teksto. Kelkajn el ili la aŭtoro prenis pretaj el la internacia slango, aliajn li adaptis al Esperanto. El la unua grupo mi nomas *„populacio"*, *„parametro"*, *„distribua funkcio"*, *„varianco"*. Pri la akceptindo de kelkaj terminoj oni povas diskuti.

„Populacio" havas plurajn signifojn, kiujn oni renkontas en la statistiko.

Biologia populacio estas kuno el malsamaj statistikaj populacioj. La vorto „parametro" havas malsamajn matematikajn signifojn. „Distribua funkcio" estas malbela termino, ĉar miaopinie la probablodensoj distribuas la observojn. Tamen mi konscias ke estas malfacile, malligi nin de la internaciaj kutimoj.

En la dua grupo troviĝas ekz. la vortoj: *observaro, laŭhazarda, taksilo, specimenaro, specimenara distribuo, specifo, ekspekto*. Kelkaj terminoj estas bonegaj, ekz. specimenaro, laŭhazarda, specifo, ekspekto.

Pri „observaro" oni povas disopinii. Imagu ke oni pristudas la konsumkvanton de vino. Eble tiun influas la uzo de biero, de brando, ktp. Nu, ĉiumonate oni observu tiujn tri kvantojn. La tri nombrojn la aŭtoro nomas observaro. Observo do ĉiam estas **unu** nombro. Mi preferus nomi observo la nombraron pri unu monato, kaj la aron da nombraroj pri la sinsekvaj monatoj mi nomus observaro. Nur tiel la gradoj de libereco dependas de la nombro de la observoj. Krome, se oni foje observas nur du kvantojn, oni ne havas informon do ne observon.

[1]) Ĉi tiu traktaĵo aperis ankaŭ en la portugala matematika revuo *„Portugaliae Mathematica"* **10** [1951] 71—80. Ni esprimas nian gratulon kaj al la aŭtoro kaj al la redakcio de la menciita gazeto.